**Okazis la 14a Himalaja Renkontiĝo en Nepalo**

La 14a Himalaja Renkontiĝo okazis de la 26a de februaro ĝis la 8a de marto 2024. Partoprenis la tutan programon 10 esperantistoj, kaj pli ol la triobla nombro almenaŭ parte. La partoprenantoj inkluzivis po unu hispano, sviso, litovo kaj franco; ĉiuj aliaj estis nepalanoj. La ĉi-jara celo de la programo estis konigi al la gastoj la nepalan naturon kaj kulturon pere de la lingvo Esperanto. Ni organizis ekologian piedvagadon por ke ili spertu la belan naturon de Nepalo kaj ekkonu la vivmanieron de nepalanoj. NEspA kun fervoro dum la 34 jaroj de sia ĝisnuna ekzisto laboras por la florado de la loka kaj regiona movado.

La programo komenciĝis la 26an de februaro per akceptado de la gastoj kiam ili alvenis. Ili estis formale bonvenigitaj en la 27a vespere en Marshyangdi hotelo en la ĉefurba kvartalo Thamel. Renkontiĝo-ĉefo s-ro L.P. Agnihotri kaj prezidantino de NEspA Indu Devi Thapaliya solene malfermis la programon. La eksterlandaj partoprenantoj — s-ino Grazina Opulskiene (Litovio), s-ro Paulino Meliz Irache (Hispanio ), s-ro Paul Henri Lesprit (Francio) kaj s-ino Laurence Aidonidis (Svislando) — esprimis sian ĝojon ĉeesti kaj deziron kontribui al la sukceso de la Renkontiĝo. S-ro Pradip Ghimire legis bondezirmesaĝojn el diversaj landoj, nome de la prezidanto de UEA Duncan Charters, s-ro Hori Yasuo, s-ro Stefan MacGill, s-ro Philip Pierce, d-ro Renato Corsetti kaj prezidanto de KAOEM s-ro Nisinaga Atusi, kaj ankaŭ de multaj enlandaj aŭ eksterlandaj nepalaj esperantistoj.

Sestaga piedvagado en la regiono de Mardi Himal komenciĝis la 29an de februaro post du tagoj dediĉitaj al ekskursoj en Katmanduo valo. Ni ekmarŝis de la vilaĝo Pothana kaj atingis en la 4a de marto Badaldanda (ĉirkaŭ 3.600m super marnivelo), trairinte Forest Camp (2.400m) kaj Low Camp (2.700m). Escepte de la du tranoktoj en Forest Camp kaj Badaldanda, ni ĉiam haltis vespere en ia etna vilaĝo. Ni vivis kiel la tieaj vilaĝanoj vivas ĉiutage. Ni tre ofte trairis arbarojn plenajn je floroj kaj bela naturo. Foje pluvis aŭ neĝis. Ni ĉiuj revenis Katmanduon post vizito en la fama turizma urbo Pokhara.

Okazis solena ferma ceremonio en la 8a de marto vespere je la kvina kaj duono en Marshyangdi hotelo. S-ro Parashar Rizal prezidis. NEspA disdonis atestojn al partoprenantoj de la 14a Himala Renkontiĝo kaj honoris ilin per nepala ŝalo metita ĉirkaŭ la kolon, dum la aliaj ĉeestantoj aplaŭdis. Ĉiu gasto komentis pri la ĵus travivata Renkontiĝo kaj donis sugestojn por estontaj Renkontiĝoj. S-ino Opulskiene diris ke kvankam la nombro de la partoprenantoj estis malgranda, la programo estis tamen valora. Tiuj venis el kvin landoj, sed ĉiu komprenis unu la alian. Komentante pri la programo, s-ro Paulo diris ke la Himalaja Renkontiĝo prezentis novan vivsperton por li: La belaj temploj, ĉarme vestitaj vilaĝanoj, sunsubiroj kaj sunleviĝoj, la neĝo kaj belaj

montoj ege plaĉis al li. S-ino Aidonidis diris ke aparte plaĉis al ŝi la esperantistoj kiuj bonvenigis ŝin per girlandoj. Dum ŝi estis en la montaro, ŝi ricevis kuraĝigon de la aliaj; alie ŝi ne sukcesintus en la marŝado. Sidante vespere ĉe fajro kaj trinkante, ŝi povis esprimi sin senĝene al la grupo. La naturo donis al ŝi pli da vivforto. Nepalaj vilaĝoj memorigis ŝin al svislandaj vilaĝoj. Poste parolis s-ro Paulino, kiu diris ke kiam li estis akceptita en la flughaveno li tuj sentis sin en vera esperanta familio – kortuŝa momento por li. La programo estis liaopinie bone organizita, kaj li pensas ke unufoje veni al Nepalo ne sufiĉos; li do intencas iam reveni.

S-ro Philip Pierce diris pri la grava rolo de Svislando dum la malfermiĝo de Nepalo en la 50aj jaroj de la pasinta jarcento, kaj precize pri Toni Hagen, kiu faris multajn esplorojn tra la tuta lando. Eskterlandanoj fakte senegoizme daŭre helpas al Nepalo, kiu siaparte invitas ĉiujn veni por miri pri ĝia beleco, ekkoni ĝian kulturon kaj kontribui mem al ĝia socia bonstato.

La ĉeestantoj memoris pri s-ro Hori, kiu escepte de tiu ĉi plej lastatempa partoprenis ĉiujn Renkontiĝojn. Li skribis ke li portos nepalan ĉapon en Japanio dum la Renkontiĝo – ankaŭ tio tre kortuŝaj vortoj.

La Renkontiĝo estis fermita de la prezidantino de NEspA Indu Devi Thapaliya kaj Renkontiĝo-ĉefo L.P. Agnihotri. Fine ni dankas al ĉiuj organizoj kaj individuoj kiuj kontribuis al la sukceso de la historie notinda 14a Renkontiĝo en Nepalo. Nome de la organizantoj mi pardonpetas, se ni iam kreis malĝojan etoson dum la vojaĝo. Ni esperas ke la 15a Himalaja Renkontiĝo okazos laŭ plano. Detaloj pri ĝi estos dissenditaj sufiĉe antaŭ la kutima dato.

Raportas Bharat K. Ghimire

**第 14 回ヒマラヤの集いがネパールで開催されました**

第 14 回ヒマラヤの集いは 2024 年 2 月 26 日から 3 月 8 日まで開催された。ログラム全体には 10 人のエスペランティストが参加し、少なくとも部分的にはその数の 3 倍以上となった。参加者にはスペイン人、スイス人、リトアニア人、フランス人がそれぞれ 1 人ずつ含まれていた。他の人は全員ネパール人でした。今年のプログラムの目標は、エスペラント語を通じてゲストにネパールの自然と文化を紹介することでした。ネパールの美しい自然を体験し、ネパールの人々の生活様式を知ってもらうために、エコロジートレッキングを企画しました。ネパール



エスペラント協会は、設立以来 34 年間にわたり、地元および地域の運動の繁栄のために熱心に活動してきました。

　プログラムは 2 月 26 日に到着したゲストを歓迎することから始まりました。外国人参加者は 2 月 27 日夕方、首都タメル地区のマルシャンディ・ホテルで正式に歓迎された。会議リーダー Mr. L.P. アグニホトリ氏と Indu Devi Thapaliya ネパールエスペラント協会会長が厳かにプログラムを開始した。外国人参加者であるグラツィナ・オプルスキーネ氏（リトアニア）、パウリノ・メリズ・イラチェ氏（スペイン）、ポール・アンリ・レスプリ氏（フランス）、ローレンス・アイドニディス氏（スイス）は、出席できたことへの喜びと、このイベントに貢献したいという願望を表明した。プラディップ・ギミレ氏は、UEA 会長ダンカン・チャーターズ氏、堀泰雄氏、ステファン・マッギル氏、フィリップ・ピアース氏、レナト・コルセッティ博士、KAOEM 会長ニシナガ・あつし氏の、国内外の多くのネパール・エスペランティストらからの祝辞を読み上げた。




　マルディ・ヒマル地域での 6 日間のトレッキングは、カトマンズ渓谷での 2 日間の小旅行の後、2 月 29 日に始まりました。私たちはポタナ村から歩き始め、森林キャンプ（2,400 メートル）、ローキャンプ（2,700 メートル）を経て、3 月 4 日にバダルダンダ（標高約 3,600 メートル）に到着しました。フォレストキャンプとバダルダンダでの 2 泊を除いて、私たちはいつも夕方にどこかの村に立ち寄りました。私たちはそこの村人たちと同じように毎日を過ごしました。私たちは花と美しい自然がいっぱいの森を頻繁に通りました。 時々雨や雪が降ったこともありました。私たちは皆、有名な観光都市ポカラを訪れた後、カトマンズに戻りました。

　3 月 8 日夕方 5 時半、マルシャンディ・ホテルで厳粛な閉会式が行われた。パラシャール・リサール氏が主宰した。ネパールエスペラント協会は第 14 回ヒマラヤの集いの参加者に賞状を配布し、他の出席者が拍手を送る中、ネパールのショールを首に掛けて参加者を讃えました。各ゲストはこの集いについてコメントし、今後への提案を行いました。オプルスキーネさんは、参加者の数は少なかったが、それでもこのプログラムは価値があると語った。彼らは 5 か国から来ていましたが、誰もがお互いを理解していました。パウロ氏はプログラムについてコメントし、ヒマラヤの集いは自分にとって新たな人生経験となったと述べた。美しい寺院、魅力的な服装をした村人たち、夕日と日の出、雪、そして美しい山々が彼をとても喜ばせた。アイドニディス夫人は、花輪を持って歓迎してくれたエスペランティストたちに特に満足していると語った。彼女が山にいる間、他の人たちから励ましを受けました。そうでなければ彼女はトレッキングに成功しなかっただろう。夜、たき火のそばに座って酒を飲みながら、彼女はグループの前で気軽に自分の気持ちを表現することができた。自然は彼女にさらなる生命力を与えてくれました。

ネパールの村は彼女にスイスの村を思い出させました。それからパウリノ氏が話し、空港で迎えられたときすぐに本物のエスペラントの家族のように感じた、それは彼にとって感動的な瞬間だったと語った。彼の意見では、プログラムはよく組織されており、一度ネパールに来るだけでは十分ではないと考えています。したがって、彼はいつかまた来るつもりです。フィリップ・ピアース氏は、前世紀の 50 年代のネパール開国におけるスイスの重要な役割について、そしてまさに国中で多くの研究を行ったトニ・ハーゲンについて語った。実際、外国人は無私の気持ちでネパールを支援し続けており、ネパールは誰もが来てその美しさに驚嘆し、その文化を知り、社会福祉に貢献するよう誘っています。



出席者は、今回を除いて、すべての集いに参加した堀氏のことを覚えていた。「集いの行われている間家ではネパール帽をかぶる」と書いていましたが、これも感動的な言葉です。集いは、Indu Devi Thapaliya 会長と会議リーダーの L.P. 氏によって閉会されました。アグニホトリさんは最後に、私たちはネパールでの歴史的に注目すべき第 14 回ヒマラヤの集いの成功に貢献したすべての組織と個人に感謝します。 旅行中に悲しい雰囲気を醸し出してしまいましたら、主催者を代表してお詫び申し上げます。第 15 回ヒマラヤ会議が予定通り開催されることを願っております。その詳細については、なるべく早くお知らせします。 バーラト・K・ギミア